

Stine Andresen,  
Somera nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Milda nokto de somero,  
Kian sorĉon havas vi!  
Vin stel-nokt' de primavero  
Anstataŭas ne por mi.

Senripozas jen deziro,  
Paca regas jen kreskad',  
Jen lasado, jen sopiro,  
Jen fariĝo, jen estad'.

Kiel ĉe l' patrin' beate 1)  
Kuŝas la naturo jen,  
Estas, kvazaŭ Di' komplete  
Irus tra l' kampar' kun ben'.

En silento kaj solene  
Staras tie la arbar',  
Klinas kvazau pensoplene  
Sin surkampe la spikar'.

Kaj tra l' plenmatura tiu  
Songas kiel song-sonor',  
Kiel akriĝad' de iu  
gren-falĉilo en la for'.

*Traduko de la Germana poemo "Sommernacht" de STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, \*1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1985-05.*

*Mr-187-2a / Arg-319-646 (2005-08-26 08:42:28)*

*La poetino vivis en Wyk sur la norda-frisa insulo Föhr, estis edzino de muelisto, verkis krom la nordafrisa poemo "Swet hiamelkhaid" precipe poemojn en la germana lingvo.*